

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 1870 de 27. I. 1922

Jaro XIX

Februaro, 1938

N-ro 4-5

Sur la internacian literatur-kampon!

Paralele kun la ĝenerala suprenleviĝo de nia enlanda esperanto-movado, rimarkeblaj estas ankaŭ la komencaj paŝoj de pli aktiva literatura kunlaborado flanke de bulgaraj samideanoj en la internacia esperanto-gazetaro.

Trarigardante parton de la internaciaj esperanto-gazetoj, ni trovis jenajn nomojn: RINMA (en la gaz. „Harmonio“), D. KOVAĈEV („Heroldo de Esperanto“), KAIN TERA („Orienta Revuo“), S. KARP („Sennaciulo“ kaj „Nia parolilo“), artikoloj pri Bulgario („R. Esperantisto“, „Sennaciulo“ k. a.), T. SAMODUMOV (Nederlanda laboristo) ktp.

Nature, ankaŭ en la pasinteco niaj malnovaj pioniroj Krestanov, Atanasov k. a. publikigis tradukojn kaj originalaĵojn.

Sed la novo, kiun ni konstatas ĉe la priparolata kunlaborado, estas a) la noveco de la nomoj, b) la fakto, ke plejparte estas publikigataj originalaj verkoj, ne tradukoj, c) la multeco de la kunlaborantoj (preskaŭ samtempe publikigas kelkaj samideanoj).

Konstatante kaj laŭdante tiun ĉi kunlaboron, ni tamen ne devas kontentiĝi pri tiu aktiveco — ni devas daŭrigi ĝin, fari ĝin sistema kaj laŭplana.

Klaras ja, ke ĉe la nuna, nekontentiga stato de nia BEA kaj de ĝia organo „Bulgara Esperantisto“, ni, dum longa periodo, ne povos publikigi ampleksajn kaj multnombrajn verkojn.

Interdume al nia redakcio estas sendataj ofte bonegaj verkoj, ĉu originalaj, ĉu tradukitaj, de bonvolaj kunlaborantoj.

Kial ni ne uzu, por ilin publikigi, la alilandajn gazetojn, vidante, ke ĉi lastaj donas volonte al ni lokon?

Per tio ni eĉ pli trafe propagandus la bulgaran nacian kulturon, literaturon kaj arton, ĉar niaj verkoj senpere atingos internacian aŭ alinacian legantaron.

Plejofte tamen niaj samideanoj ne scias kion traduki kaj ne scias por kiu gazeto destini sian tradukon.

Tie ĉi povus helpi la redakcio de „B. Esperantisto“ per sia interveno.

Ĝi devas: 1) elserĉi kaj disponigi al la bezonoj de tiu kunlaborado laŭeble ĉiujn bulgarajn samideanojn, kapablantajn verki originale aŭ traduki;

2) fari indikson de verkoj tradukendaj el la bulgara literaturo aŭ de artikoloj verkendaj pri certaj temoj (nacia arto, moraro, teatro, muziko ktp.);

3) fari planon kaj distribuon de la laboroj;

4) revizii kaj kontroli lingve la verkojn;

5) rekomendi kaj peri la transsendon de la verkoj, laŭ ilia karaktero, al la respektivaj internaciaj esperanto-gazetoj.

Estus praktike, se per la organizado kaj la plenumado de tiu laboro oni ŝarĝus unu aŭ kelke da spertaj samideanoj.

As. Grigorov

KVAR BULGARAJ POPOLKANTOJ

Stojano — paŝtisto kaj la elfino

Panjo al Stojan parolis:
 „Stojano, filo, Stojano,
 ne paŝtu vian ŝafaron
 en la elfinaj arbaroj;
 se vi ĝin paŝtas arbare,
 vi per la fluto ne ludu
 por ke ŝi vin ne ekaŭdu —
 ŝi — la malbona elfino,
 por ke ŝi kun vi ne luktu!“

Stojano ŝin ne obeis,
 li paŝtis sian ŝafaron
 en la elfinaj arbaroj,
 li per la fluto ludadis
 kaj la elfinon invitis
 alveni por kun li lukti.
 Jen, la elfino alvenis —
 similis al knabo juna,
 kaj komenciĝis la lukto.
 Tri tagojn ili luktadis —
 Stojano certe ŝin venkos...

Sed tiam l' elfino kriis:
 „Ventegoj, karaj gefratoj,
 Stojano certe min venkos.
 Alvenu kaj al mi helpu!“

Ventegoj tiam alvenis
 Stojanon alten forprenis.
 De arb' al arbo lin frapis
 de pint' al pinto lin ŝetis
 kaj pec-po-pece disŝiris,
 ŝafaron lian — dispelis.

Trad. *Kosta Haralambiev*

Junulino kaj bukedo

Junul' venas el arbaro,
 bravul' venas el arbaro,
 en la manoj du bukedoj,
 du bukedoj de violoj.
 Al li venas, lin renkontas,
 lin renkontas junulino,
 al li diras kaj parolas:
 — Donu junul', donu, bravul',
 la bukedon de violoj.
 — Ho knabino, junulino,
 florojn donojn, vin mi prenos.
 — Ho junulo, ho bravulo,
 buked' daŭras ĝis tagmezo,
 knabin' dum la tuta vivo!

Trad. *Simeon Hezapčiev*

Janka kaj la arbaro

Janka tra l' arbaro iris,
 per folio pira flutis
 kaj flutante ŝi parolis:

„Arbaro, verda arbaro,
 arbaro, kara fratino,
 ĉu vi ne vidis renkonte
 mian frateton Ivanĉon,
 mian amaton Todorĉon
 vagi kun bando hajduta?...“

El arbo ĉirpis birdeto,
 al Janka moke parolis:

„Ho, Janka, Janka belega,
 estante tiel belega
 kial vi estas malsaĝa?
 Se la arbaro parolus —
 ja ĝin ne hokus lignistoj
 kaj ĝin ne paŝtus kapristoj!...“

Trad. *Rinma*

Knabino plantis ...

Apud la maro
 knabino bela
 plantis vitaron
 kun blank-vinberoj...
 Plantis kaj kantis
 kanton doloran:

„Vitaro mia,
 kun blank-vinberoj!
 Mi vin enplantos,
 sed mi ne scias
 kiu manĝados
 la blankajn berojn,
 kiu fordrinkos
 la dolĉan vinon?
 Mi ja ne konas
 iun en mondo
 kiu min aŭdus
 kaj min komprenus;
 — Amato mia
 vagas fremdlande.
 Malliberejo —
 patron mortigis...“

Trad. *Hr. Manolov*

AEROPLANOJ EN LA NOKTO

La bubaloj paŝis malrapide laŭ la arbara vojeto. De tempo al tempo iu el ili deflankiĝis kaj avide langokaptis fasketojn da herboj. Sed la longa pikstango de mia avo envojigis ĝin senprokraste.

— Nesatigeblaj! — riproĉis li, — tutan herbejon forpaŝtis, kaj ree malsataj...

Mi iris silente apud li, dum mian knaban animon karesis la arbara trankvilo. En la interno de l' arboj kveris mallaŭte turtoj. Vespertoj preterzumis. En la marĉetojn ensaltis la ranoj, timigite de nia proksimiĝo. Timis la kompatindaj bestetoj mian manon, kiu emis svingi ŝtonojn sur ilin. Nun tamen mi ne havis plezuron pri tio. En la vejnoj de miaj brakoj estis peze, kvazaŭ ilin trafluus fandita plumbo. Miaj kruroj doloris. Ĉar malfacila estis la laboro dum ĉi tago: mi kondukis la jungitan bestoparon sur la plugkampo. Herberoj logis ilin jen dekstren jen maldekstren. Mi devis streĉadi miajn tutajn fortojn por irigi ilin. Krome, la avo dum la tuta tago kolere alkriis min. Aliaj kulpis, aliaj igis lin kolera, — la grenkonfiskantoj, — sed li elverŝis sur min sian koleron. Mi tamen ne malamamis lin. Mi sciis, ke li estas bona avo, ke li preparas ĉi nekulturitan kampojn por la venonta jaro; je ĉi kampo li esperas vivsubteni sian familion, savi ĝin ge l' malsatmorto.

La arboj maldensiĝis. Antaŭ ni etendis sin la vasta ebenaĵo, vualita de vespera grizo. El la malproksimo flametoj sendis siajn lumojn al ni! tio estis la domoj de l' vilaĝo, al kiu ni celis.

Senparole ni atingis la fervojon, transiris ĝin. Miaj okuloj vidis la siluetojn de l' randaj domoj. Dekstre antaŭ ni, inter la pintoj da l' montaro, leviĝis la granda serena disko de l' luno. Mola lumo surverŝis la dormantan kamparon de Trakio. En mia animo, malgraŭ la laco, ĝermis dezirego vagi tra vojetoj, laŭ la bordoj de l' rivero. Sed la avo estas severa; li ne permesas tion. Oni devas iri hejmen, endormiĝi, por vigli dum la sekva mateno, por plua laboro.

Ni eniris la korton. La virinoj enstaliĝis la bestojn, dum ni lavis nin kaj en-

iris la kuirejon. Nia vespermanĝo konsistis el sekala pano kaj buterselakto, sed ni kontentis. Oni ankaŭ ĝin ne havis. La milito forrabis ĉion.

Mia patrino faris longajn preĝojn, genuine antaŭ la ikono. Ŝi devigis ankaŭ min fari la samon. Mi enlitiĝis. Tra la ondoj de mia penso naĝis la radianta lumo. Kun deziro je ĝia kareso min eklulis la dormo.

* * *

— Rapide eksteren! — vokis voĉo, kaj mi sentis, ke peza mano skuas min.

Mi frotis la okulojn. La patrino tiris min for el la lito.

— Kio estas? — demandis mi dormsoife.

— For, for, aeroplanoj! — timvoĉe avertis ŝi, tirante min sur la korton.

Per rapidaj paŝoj ni atingis la stalon, preterpasis ĝin, alrampis la viburnoarbon, haltis sub ĝi. Miaj oreloj kaptis la terurigan bruon de l' aviadiloj, kiuj proksimiĝis.

— Ni kuŝiĝu ĉe la muron! — ordonis la patrino kaj ree tiris min kun si. Mi faletis, stariĝis, senspire atingis la muron de l' korto. Tie kuŝis jam la ceteraj hejmanoj, atendante la mortportantojn.

Ili ne malfruiĝis: grandega silueto muĝegis super la domtegmentojn. Malalte flugis ĝi, ke la kanonoj ne riskis sputi kuglegojn kontraŭ ĝin. Neniu el ni kapablis prononci vorteton. Nur niaj okuloj sekvis la monstrojn, kiuj trankvile serĉis siajn viktimojn per helpo de l' luno. La sekundoj pasis malrapide. Kial ili ne komencas jam?... Kaj jen — ili komencis: bomboj tremigis la teron. La fenestrovitroj saltis el siaj kadroj kaj rompiĝis en pecetojn. La bubaloj rompis la stalpordon kaj, blekegante, kuregis tra la korto. La avo rigardis ilin kvazaŭ paralizite. Bomboj eksplodis unu post la alia. Brulegoj lekis la ĉielon — brulis domoj kaj fojnamasoj de l' militistaro.

Fininte sian taskon, la mortsemantoj forflugis, ĝenate de neniu.

El la domoj saltis soldatoj kaj gevilaĝanoj kaj kuregis al la fajrolokoj.

Mia avo prenis sitelon kaj ankaŭ rapidis eksteren. Mi kuris post lin. La

1,000 abonoj de „Bulg. Esperantisto“

Dum la nuna jaro antaŭstaras al ni ankaŭ la tasko pliigi la abonojn de „Bulg. Esp-isto“ al 1,000. Sed kiel agi por atingi tiun ciferon? — Jen estas la demando, staranta antaŭ ni. Mi opinias, ke la multnombraj pacaj batalantoj en la diversaj lokoj de nia lando kaj la novaj, venantaj el la multaj esp.-kursoj en niajn vicojn, estas sufiĉe bona garantio por la plenumo de nia tasko kaj por la plibonigo de nia organo ĉiurilate.

Laŭ mi, ni sukcesos efektiviĝi la fiksitajn taskojn jene:

1. Ĉiu societo elektu unu el la plej agemaj samideanoj, kies tasko estu prizorgi la kolektadon de abonoj. Malgraŭ la tre malalta abonpago, ni devas konstati, ke ĝi tamen prezentas certan ŝarĝon koncerne kelkiujn. Kaj ĝuste tiun laboron plenumos la jam fiksitaj samideano — kolekti la abonojn poparte: je duonoj aŭ kvaronoj, laŭ la ebloj en la momento. Tiamaniere nur en nemultaj semajnoj estos kolektita la tuta sumo kaj poste sendita al la redakcio.

2. Multaj el niaj s-anoj korespondas kun alilandaj korespondantoj, por kiuj la plej granda ĝojo kaj donaco estas ricevi esperanto-gazeton el nia lando. Do ili povus sendi nian organon al siaj amikoj, tamen ankaŭ la redakcio devas fari certajn rabatojn, aŭ doni premiojn al la s-anoj kiuj volus ricevi la gazeton en pli ol unu ekzempleroj.

3. Estus ankaŭ bone, se la redakcio antaŭvidos donacojn por la plej aktivaj abonkolektantoj de „B. E.“ en la fino de la jaro.

En nia urbo, ekz., de 17 abonoj, ni penas plialtigi la kvanton al 30 abonoj dum la nuna jaro.

Do al streĉa laboro por la plialtigo de la abonoj ĝis 1000 — 1500 dum tiu ĉi jaro kaj por plibonigo de l' gazeto!

Espero, Aŝenovgrad

patrino baris al mi la vojon. Mi superuzis ŝin kaj atingis la avon.

La krakegoj de l' brulmordataj konstruaĵoj montris al ni la vojon. Gigantaj fajrolangoj rikanis al la senhelpaj est-

Ni plibonigu nian kulturan laboron

La fundamenta karaktero de nia esp.-movado estas precipe kulturkleriga kaj pacbatala. Sed aperas la grava demando — ĉu ni scipovas lerte kaj sufiĉe bone organizi kaj efektiviĝi tiun gravan laboron kaj tiamaniere puŝi alten niajn esp.-societojn en tiu rilato.

Certe, la apartaj societoj jam havas sian sperton tiufanke kaj ĝuste tiun sperton ni devas utiligi en nia agado.

La Sofia societo, ekzemple, havis la bonan ideon organizi laŭplane sian kultur-agadon, post certaj serĉoj de agadformoj. En kunveno estis elektita kvinpersona kulturkomisiono kun sia sekretario. Post la kunvenoj, aŭ kiam estis oportune, la komisiono kunsidis kaj el-laboris planon de sia laboro. Estis ellaborita tre detala kaj laŭfaka temaro por referaĵoj. La plano estas elmetita en la kunvenejo en formo de afiŝo. Kopioj de la temaro estas senditaj al la plej spertaj esperantistoj kun la invito elekti laŭplaĉe temon kaj referi dum difinita kunveno.

La komisiono ankaŭ planas la tagordon de ĉiu kunveno kaj ĝin proponas al la estraro. Ĝi eĉ organizas la redaktadon de la mura gazeto kaj multajn aliajn kulturlaborojn kaj tiamaniere helpas kaj instigas la estraron kaj la aron al pli aktiva kaj fruktodona laboro.

La nesufiĉa amplekso de konciza artikoleto tute ne permesas, ke mi fiksu detale la tutan laboron de la kultura komisiono, tamen la meminiciato ludos tiurilate la plej gravan rolon.

Estus tre utile, se ankaŭ la aliaj esp.-societoj elmontros al ni siajn tre valorajn spertojn kaj provojn.

Angel Ivanov — Sofia

ingantoj, kiuj freneze kuris tien kaj reen. Oni postulis akvon. El la brulantaj domoj oni portis cindigitajn kadavrojn. Korŝira ploro tordis la animojn: patrinoj ploris pri mortigitaj idoj; infanoj ploris pri dispecigita patrino.

El inter la fum-nuboj rikanis la lundisko...

Hr. Iskrov

Ĉe la familio kie la gepatra lingvo estas esperanto

Post longa marŝado, en la fino de la urbo, mi atingas la celon. Ĝi estas la hejmo de nia samideano *Boris Vasilev*. En la fundo de la kortoĝardeno — unuetaĝa dometo. Mi frapas kaj eniras la ĉambron.

— Saluton kaj bonan tagon!

— Bontagon! Bonan venon — ĝoje renkontas min la dommastrino. — Bonvolu, samideano, sidiĝu!

Sur du seĝoj, metitaj unu sur la alia, por atingi la altan tablon, sidas la malgranda (du jaroj kaj kvin monatoj) Stefĉjo. La patrino mem nutras lin, parolante en esperanto. Stefĉjo ankaŭ estas esperantisto. Tamen li estas tre hontema kaj nek rigardas min, nek respondas al miaj demandoj. Al mi kuras Laŭra — la kvarjara fratineto de Stefeto. Kontraste al sia frateto, Laŭra venas kaj gratulas min per belvoĉaj esperantaj vortoj:

— Bonan venon, onklo!

La dommastro ne ĉeestas. Mi demandas Laŭra'n kial ŝia patro ne venis kaj kie li estas. La babilema kaj ludema knabineto respondas en perfekta esperanto:

— Li havas laboron. Paĉjo baldaŭ venos por tagmanĝi.

En tiu-ĉi familio ĉiuj: la gepatroj kaj la geinfanoj parolas ĉiam nur esperanton. *La gepatra lingvo* estas nia internacia helplingvo!

Mi iras kun la infanoj en la korton. Mi ludas kun ili per iliaj modestaj infanludiloj. La hontema Stefĉjo ludas kun mi, sed neniun vorton diras, bedaŭrinde. Mi demandas lin, montrante diversajn objektojn, por paroligi lin.

— Stefeto, kio estas tio?

— Ĉifonoj — dolĉe respondas li, kaj denove ekmutas.

Laŭra pensas, ke mi vere ne scias kaj demandas:

— Ĉu vi forgesis la esperantajjn vortojn?

Mi klarigas. Kaj ni ambaŭ paroligas la knabeton. Sed la obstina hontemulo mutas kaj mutas. Unu — dufoje li eraras kaj diras: — Jes.

La pliaĝa Laŭra scias ankaŭ la bulgaran lingvon. Stefĉjo tamen parolas nur esperanton.

Tagmezo pasas. La dommastrino vokas nin.

— Venu, miaj karaj, por ke ni manĝu. Boris tro malfruiĝis. Ni ne povas atendi plu.

Ĵus ni ekmanĝas kaj la patro frapas la pordon.

— O, saluton! Bonan venon al ni.

— Saluton, saluton — respondas mi. Manĝante, Boris rakontas kiamaniere li edziĝis al sia edzino. Ŝi — Elizabeta — estas hungarino. Ĉe internacia esperanto-kongreso ili konatiĝis. Poste komencis korespondadi. Tiel venis ankaŭ la amo: esperanto vere pacigas, ligas kaj unuigas la homojn. Ili geedziĝis. Elizabeta venis Bulgarion. Nek ŝi komprenis la bulgaran lingvon, nek li — la hungaran. Ili interkompreniĝas nur per esperanto. Kaj al la infanoj ili instruis esperanton. Nun Elizabeta jam bone parolas bulgare.

Post la manĝado ni aranĝas amuzduonhoron. Laŭra deklamas kelkajn esperanto-versaĵojn kaj fabelojn. Mi violonas. Poste la dommastroj kantas esperantajjn kantojn. Stefeto nur observas kaj mutegas. Ni finas la amuzon per la esperantista himno.

Mi staras preta foriri. Apenaŭ nun Stefĉjo ekmoviĝas. Mi eble plaĉas al li. Kaj li parolas, ripetante la vortojn de siaj gepatroj, formanĝante iujn literojn de la vortoj.

— Onk'o! Bonbo'u veni... gastu... venontan dimanĉon a' ni. Ni dezi'egas vin. Kun la vio'ono... Mi pa'o'os mu'te kun vi. Pa'donu a' mi... Ĝis 'evido... onk'o... — balbutas dolĉe la knabeto.

— Vi parolos?

— Jes — konfirmas Stefĉjo.

— Bone. Mi nepre venos. Ĝis revido!

— Ĝis revido, ĝis revido — diras ĉiuj al mi.

— Ĝis revido — ripete diras mi, kontenta kaj gaja, adiaŭante la karan esperantistan familion.

Ivan Dimitrov

KOLEKTIVA KORESPONDADO

Konata estas la fakto, ke multaj el la gesamideanoj, finintaj la esp.-kursojn, post nelonga tempo izoliĝas, forlasas kaj forgesas la lingvon. Malĝojiga fakto, tamen fakto! Ne estas pli granda krimo antaŭ la memoro de nia *majstro* Zamenhof ol preterlasi la jam forĝitajn geesperantistojn kaj „ĉasi“ novajn.

La kaŭzoj de tio estas multaj. Mi nur mencios unu el la tre gravaj kaŭzoj; ĝi, estas tiu, ke la finintaj la kursojn gesamideanoj ne ricevas bonan kaj ĝustan direkton koncerne la *uzon de la lingvo*. Ili kutime estas informataj pri la nombro de la tutmonda esperantistaro, pri la enkonduko de la lingvo en diversaj landoj kaj lokoj ktp., tamen eĉ tion ne ĉiuj povas konstati, ĉar ili ne konas la organizon de la tutmonda esp.-movado kaj ne estas en kontakto kun ĝi.

Despli malbonaj estas la rezultoj, kiam la kursgvidantoj trograndigas la faktojn pro sia kutima entuziasmo kaj idealismo.

Kiom belaj kaj utilaj aferoj okazas en la mondo, kaj ili restas nekonataj al ni! Kiom da iniciatoj kaj plej interesaj ideoj aperas inter niaj rondoj, sur la kvin kontinentoj de la terglobo, pri kiuj ni tre malofte estas informataj.

La vivo de niaj societoj kaj grupoj estas anemia kaj pasiva. La sekaj oficialaj kunvenoj kaj protokolitaj decidoj nur bremsas la organizan vivon, kiu efektiviĝas tre stereotipe. Niaj gesanoj restas en mallumo kaj ni perdas ilin unu post la alia.

Kion fari? Kiel altiri ilin por ĉiam al niaj societoj? — La respondo estas nur unu — ni devas *kontaktigi* ilin kun la tutmondo per esperanto. Esperanto estas antaŭ ĉio lingvo. Ĝi estas ilo por kontaktiĝo kun la vasta mondo per korespondado, kiam ne estas ebla persona interrilato. Bedaŭrinde ĉe la nunaj vivkondiĉoj la korespondado estas tro multekosta afero kaj malfacile efektivebla por la apartaj personoj. Tion speritis ĉiu fervora esperantisto. Jen kial mi proponas *la kolektivian korespondadon*.

Sed kio ĝi estas kaj kiel ĝin efektiviĝi? Jen mi klarigas al vi:

Ĉiu societo aŭ grupo antaŭ ĉio devas posedi ia jarlibron de U. E. A., de I. E. L. aŭ alian adresaron. Per ĝi la grupo (aŭ la societo) povas facile kontaktiĝi kun alia grupo aŭ societo el aliaj landoj. En difinita tago de la semajno la grupanoj kunvenas kaj sub la gvido de pli sperta esperantisto skribas leterojn pri diversaj temoj, aŭ petas informojn pri diversaj aferoj, ilin interesantaj. Ĉiuj leteroj estas kolektataj kaj post ilia korekto, iliaj aŭtoroj reskribas bele ilin kaj en komuna koverto estas sendataj al grupo aŭ societo en difinita lando, kun peto, ke la apartaj leteroj estu legataj en la grupkunveno, kaj ke oni ilin pridiskutu kaj disdonu al la apartaj membroj por respondo. La respondojn oni sendu laŭ la sama maniero al nia grupo, kiu legos kolektive la leterojn kaj ilin konservos.

La leteroj povas esti skribataj en 1-2-3 aŭ pli da kopioj kaj sendataj al tiom da adresoj en kelkaj landoj.

Tiamaniere la grupo kontaktiĝos kun multaj landoj kaj urboj kaj laŭ la diversaj faritaj demandoj la grupo ricevos plej diversajn informojn kaj respondojn. La vivo de la grupo plivigliĝos kaj la aparta samidean(in)o utiligos kaj celkonformigos la perditan tempon por la lingvolernado. Niaj novaj samideanoj komprenos, ke esperanto servas kaj elvokas la senton de kolektivismo kaj solidareco.

Ne malpli grava estas ankaŭ la monflanka demando. Anstataŭ pagi por ĉiu aparta letero po 7 levoj, plus apartaj kovertoj, kartoj k. a., vi pagos la ĝeneralan poŝtafrankon de la kolektiva letero, kiu estas multe pli malalta.

Do vi provu la proponitan de mi manieron kaj vi konvinkiĝos ke viaj klopodoj ne estos vanaj! La membroj vizitos regule kaj ĝojplene la kunvenojn kaj ili antaŭeniros en la perfektigado kaj praktikado de la lingvo.

Rad. K. Triĉkov

Multe pli valora akiraĵo por via alilanda korespondanto estos unu numero de „Bulgara esperantisto“ ol ilustrita poŝtkarto, kiu ja kostas duoble!

BICIKLANTE NI PROPAGANDU

De multe da jaroj mi estas biciklisto, sindona al la bicikla sporto, tamen kiel verdstelano mi portas antaŭe sur mia biciklo malgrandan esperantan standardeton jam ses jarojn.

Mi rimarkis, ke multaj biciklistoj portas diverskolorajn standardetojn, tamen neniam mi renkontis biciklon, portantan esperantistan signon — nian standardon.

Mi vizitadis ĝis nun multajn urbojn kaj vilaĝojn en nia lando, ĉiam kaj ĉie demandite al kiu nacio apartenas tiu-ĉi standardo — kaj mi kun granda plezuro kontentigis la scivolemon de la demandantoj: ke tiu ĉi standardeto signifas *esperanton*, ke ĝi estas emblemo de la homoj kiuj servas al granda ideo, celanta unuigi la homojn de la tuta mondo.

Multfoje, trapasante la stratojn, al miaj oreloj alvenis la vortoj:

— Hej, vidu, vidu sur la biciklete flirtas esperanta standardo — kaj la akompanantoj konsternite aŭdante la novan vorton, demandas, kio estas esperanto, kaj forirante mi apenaŭ aŭdas la klarigon: „Esperanto estas internacia lingvo“.

Propagandante tiamaniere esperanton mi permesas al mi rekomendi al ĉiuj gesamideanoj biciklistoj tuj meti sur siajn biciklojn la esperantistan standardeton. Per ĝi dum la tuta jaro, ni propagandos esperanton per maniero originala kaj sukcesplena.

Ni portu ĝin kun fiero.

Stefan Konjarov — Ruse

Noto de la redakcio.

Ni aprobas la proponon de samideano *Stefan Konjarov* kaj aldonas, ke alilande — precipe en Holando, Danlando k. a., kie oni amase praktikas la biciklo-sporton, tre ofte oni povas vidi ankaŭ nian verdan standardeton, kroĉitan sur preterkuranta biciklo.

Niaj legantoj povas liveri al si verdajn flagetojn por biciklo, faritajn el bonkvalita kolordaŭra ŝtofo (longeco 26 cm.), prezo 0.30 guld. (ĉ. 15 levoj), ĉe la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwvstraat 172, Den Haag — Nederlando.

Zigzage tra la gazetaro

En *Esperanto Internacia* D-ro Robin, parolante pri nia Majstro, diras:

„Ĝuste dank' al tiuj ecoj de granda prudento, modesto, takta rilato al ĉiuj, demokrateco — li akiris nian amon, niajn korojn.

Tio kaŭzis la grandan estimon kaj adoron ne nur de samideanoj, sed ankaŭ flanke de multaj potencaj spiritoj, kiel ekz. Max Müller, Lev Tolstoj, Aŭgust Forel, Charles Richet k. a.“

NIA GAZETO publikigas artikolon de bulg. samideano Srednogorski, el kiu ni ĉerpas la lastan paragrafon:

La feliĉa ĉiam diras al la vivo sian „malgraŭ tio!“ kaj ĉiam posedas la kuragon renkonti la malvenkon. Malfeliĉa estas nur la malgrandanima, la suferanto de l' koŝmaro, kiu estas nenio por la aliaj kaj nenio estas por li, kiu ĉiam diras en sia vivo: „Jeŝ, tamen!“ En la vortaro de l' feliĉulo ne estas loko por la vortoj „tamen“ kaj „sed“.

Esperanto (Ĝenevo):

„...UŜE (Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo) ne ekzistas, dume Esperanto *jes*. Do por propagandi valoran ideon, oni devas propagandi samtempe alian, dependan de faktoroj tute ekster nia povo. Ke s-ro J. Z. propagandu la ideon de unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo, bone! Sed li ne oferu la honestan nomon de esperanto, nomon konatan ĉie kaj karan al ni“.

Plej varola donaco por via alilanda korespondanto!

Ĝus aperis

ELEKTITAJ RAKONTOJ

*de Jordan Jovkov
fama bulgara beletristo-
klasikulo, mortinta 1937*

La esperanto-traduko estas majstre farita de *Hr. Iskrov* k. a. tradukistoj.

Prezo nur 10 bulg. lev.

Liveras la eldoninto:

Dim. Andreev, Asenovgrad

Semajnaj esperantaj dissendoj

La esperanta radioaŭskultado helpas nin por korekti kaj internaciigi nian *el-parolon*, kutimigas nian oreĵon al fremda *prononco* kaj donas al ni oportunan eblecon ekkoni aliajn landojn, aliajn popolojn kaj konstati kun ĝojo, ke multo el tio, kio mankas al ni, ekzistas almenaŭ aliloke.

Tial „Bulgara esperantisto“, kiu en sia tiu-ĉi-jara 2-a numero donis al ni la programon de la esperantaj *ĉiusemajnaj* dissendoj, faris bonan servon al niaj radioamatoroj.

Tamen, ne ĉiuj dissendoj estas aŭdeblaj. La nova aŭdemulo riskas multe kaj malprave koleri jen al sia aparato, jen al la respektiva stacio aŭ al la momenta stato de la vetero. Tial per tiu ĉi artikoleto mi dezirus ŝpari liajn nervojn, klarigante, kial certaj stacioj ne estas aŭdeblaj, kiuj estas aŭskulteblaj kaj laŭ mi — aŭskultindaj.

* * *

La unua lunda stacio de la 19:20 ĝis la 19:30 estas signita kiel Radio-Suisse Romande. Fakte ĝi estas Ĝenevo. En iuj aparatoj ĝi estas enregistrita kiel Sottens, verŝajne laŭ la elsendejo mem, kiel Vakarel por Sofio. Tiu ĉi stacio estas de — 100-kilovata potenco, do, sufiĉe forta. Tamen pro la *apudeco* de altaj montaroj, kiuj estas fokuso de oftaj veteraj konfuzoj, estas aŭdeblaj oftaj kraketadoj. Malgraŭ tio, la elementa esperanta kurso de s-ro Pol Buvie (Paul Buvier) estas sufiĉe bone aŭdata. Mi ne scias, ĉu sub tiu modesta nomo ne kaŝiĝas s-ro profesoro Buvie, la organizinto de la Ĝeneva pedagogia esp. konferenco, tiom grava por nia movado. La menciita kurso estas interesa ne nur por svisoj, sed ankaŭ por alilandanoj, kiuj devus refreŝigi siajn gramatikajn konojn, esperantajn kaj francajn. Do Ĝenevo estas bone aŭdebla kaj auskultinda.

La dua stacio estas Montpelié (Montpellier). Ĝia esperanta kroniko verŝajne estas tre interesa. Bedaŭrinde la stacio estas tre malforta — nur 0.8 klv. kaj tial neaŭdebla.

La tria stacio PRF2 Vera Kruz 1460 metroj nek figuras en miaj stacilistoj,

nek estas kaptebla de mia 5-lampa aparato (Philips, 456 A — harmonia serio, 1937) kun ekstera anteno. Mi supozas, ke ankaŭ tiu stacio estas tre malforta.

Tiel el la 3 lundaj dissendoj nur 1 estas bone aŭdebla — tiu de Ĝenevo.

La unua marda dissendo je la 19-a horo ĝis la 19:15 estas tiu de la Ĉeĥoslovaka stacio — Moravska - Ostrava. Ĝia potenco estas 11 klv., do iom malforta. Ordinare ĝi dissendas tradukitajn paroladojn de landaj profesoroj aŭ de aliaj eminentuloj pri *humanaj* temoj. La pritrakto estas *verema*, liberpenso, bonstila. *Tiuj paroladoj estas vera nutraĵo por la animo*. Do, la stacio, kvankam malforta, estas tre aŭskultinda.

La dua marda stacio estas Hilversum aŭ pli ĝuste Hewicen. Ĝi estas sufiĉe forta — 40 klv., sed surdigata de la Rumana nacia radio-stacio, kiu estas trioble pli forta (150 klv.) kaj 8 — 9 fojojn pli proksima al ni.

La ceteraj dissendantoj ne nur de mardo, sed de la tuta semajno, escepte unu, ankaŭ ne estas aŭdeblaj. La kaŭzoj estas diversaj; malforteco (ekz. Kopenhago — 10 klv.), malproksimeco (Rio de Ĵanejro), fortaj kaj surdigantaj najbaroj k. a. Same iuj stacioj dissendas tro malfrue aŭ tro true.

La supremenciita escepto estas Romo, sabaton vespere de la 20-a ĝis la 20:20, 420 m. Malgraŭ siaj ne multnombraj kilovatoj — 50, ĝi estas mirinde laŭta, klara kaj naturtona. Ĝi pritraktas precipe turismajn aferojn: poeziajn, bonstilajn kaj klare elparolatajn priskribojn de italaj naturbelaĵoj kaj vidindaĵoj.

Tiel de la 17 enprogramitaj stacioj nur 3 estas aŭdeblaj. Inter ili Ĝenevo estas plej forta, sed Romo estas plej bone aŭdata. Tamen pro siaj temoj Moravska-Ostrava estas plej aŭdinda. Tiu okazo memorigas al ni la *pritaksadon* de la popola grandeco laŭ Viktor Hugo. Li deklaris ie proksimume la jenon: „Granda popolo ne estas tiu, kiu estas multenombra kaj kiu loĝas en vasta teritorio, sed tiu, kiu en sia ĉiutaga vivo praktikas virtojn“. Simile, koncerne la

LA VERKARO DE D-ro ZAMENHOFF

10. *La Biblio*. Известно е на всички, че това е най-разпространената книга на свѣта. Тя се състои отъ две части: Стария Заветъ или Библията, въ тѣсенъ смисълъ на думата, и Новия Заветъ или Евангелието. Тия части се състоятъ, отъ своя страна, отъ отдѣлни книги (Стария Заветъ има такива 39, Новия—27). Оригиналътъ на Стариятъ Заветъ е на старо-еврейски езикъ. Къмъ него сж били прибавени, въ една покъсна епоха, и нѣколко книги на грѣцки. Оригиналътъ на Новиятъ Заветъ е на грѣцки езикъ.

Замenhoфъ е превелъ Стария Заветъ дословно отъ староеврейския оригиналъ. Този преводъ е неговата предсмъртна, най-голяма творба. Той си замина само нѣколко седмици следъ довършването на превода.

Днесъ мнозина сж настроени противъ Библията, а има и мнозина, които я защищаватъ. Но твърде малцина сж тия, и отъ дветѣ страни, които сж проучили това въ висша степенъ забележително произведение. Библията е книга съ такова богато и интересно съдържание, щото заслужава вниманието на всички. Самъ Замenhoфъ казва следното: „Kiajn ajn vidpun-

grandecon de la radio-stacioj, mi volus diri: granda stacio ne estas nur tiu, kiu estas multkilovata, kiu posedas bonan studion kaj kiu disponas per forta orkestro, sed tiu, kiu antaŭ ĉio dissendas la bonan veron. Tia granda stacio nun estas Moravska-Ostrava. Ĝi estas la nuntempa idea lumturo de tuta Eŭropo.

La semajnaj esp. dissendoj estas akiraĵo de longa penado de la respektivaj urbaj aŭ naciaj samidean(ar)oj. Ilia subteno kaj plua disfloro bezonas ĉirkaŭlandan kuraĝigon. Kaj se ni deziras plue profiti ilin, ni devas kuraĝigi ilin de tempo al tempo almenaŭ per simpla poŝtkarto.

Fine, la bulgaraj radiamatoroj dankas al la redakcejo de B. E. pro la presita semajna esperanta radio-programo. Tamen bone aŭdeblaj estas nur tri stacioj: Moravska-Ostrava, Roma kaj Ĝenevo. Ni ne preterlasu konvenan okazon kuraĝigi ilin.

Agro, Kneĵa

ktajn ĉiu el ni havas pri (Fino) aferoj religiaj, neniu (eĉ la plej granda malamiko de ĉiu religio) povas nei, ke el la tuta ĝisnuna literaturo de la homaro, la plej granda verko sendube estas la Biblio“. Ние обръщаме сериозно внимание на есперантиститѣ върху тази книга. И то не защото искаме да ги правимъ евангелисти, а защото езиковата стойностъ на есперантския преводъ на библията е огромна. Това е последното произведение на Замenhoфъ. Това иде да ни подсказе, че, сигурно, езика на библията е най-съвършенъ. Това е действително така. *Никой отъ националнитѣ преводи на Библията не може да се равнява на есперантския такъвъ*. Всички есперантисти трѣбва да знаятъ това и да се гордѣятъ. Защото, повечето отъ националнитѣ преводи сж правени отъ латинския преводъ, който, отъ своя страна, е правенъ отъ грѣцкия такъвъ, който пъкъ е превежданъ отъ оригинала. Такова едно препревеждане не може да даде никаква сигурностъ за стойността на превода. Сжщата сждба има и българскиятъ преводъ, който ни поднася една голяма книга въ единъ преводъ съ много несъвършенства. (Старобългарскитѣ преводи сж много добри; добри сж и тия правени презъ миналия вѣкъ, макаръ и да сж на „немодеренъ“ новобългарски езикъ). Есперантския преводъ е направенъ направо отъ староеврейския оригиналъ, отъ човѣкъ, който е познавалъ отлично и двата езика. Прочетете нѣколко реда отъ една българска библия, прочетете нѣколко реда и отъ една есперантска такава и веднага ще схванете на кой преводъ трѣбва да дадете предпочитание. *Библията е езиковия шедьовъръ на есперантската литература*.

По настоящемъ библията (Стариятъ и Новиятъ заветъ, заедно, като Новиятъ Заветъ е преведенъ отъ други) се издава въ голѣми количества отъ Британското Библейско Дружество. Стариятъ Заветъ обхваща 772 страници, а новиятъ — 226, на две колони, върху тънка хартия, съ много ясенъ шрифтъ и въ хубава подвързия. Дветѣ книги заедно струватъ 120 лева.

По рано е имало отдѣлни отпечатъци отъ различнитѣ книги на библията, но тия отпечатъци сж вече изчерпани, съ изключение на „*La predikanto*“ и „*Levidoj*“,

RECENZO

Malfacila tasko — recenzi verkon de bona amiko kaj samideano. Ĉar oni devas nek tro laŭdi, nek tro riproĉi, kaj tamen diri la veron.

Unue — la aŭtoro zorgis pri la eksteraĵo de sia libro, ke ĝi estu facile kaj klare legebla. Kredeble, li definitive liberigis de la antaŭjuĝo, ke — ĉar Esperanto estas populara afero — ĉiuj verkoj en ĝi devus havi mizeran aspekton.

Due — ĝenerale la libro estas bona. Kompreneble nur por kursoj, por kiuj ĝi estas destinita, — ne por memlernantoj. Ifoje la aŭtoro insiste volas doni al sia verko nepre „ne-neutralan“ karakteron. Ŝajnas al mi, ke, sur la kampo de la internacia lingvo „neŭtraluloj“ kaj „ne-neŭtraluloj“ estas egalaj, ke ili kune batalas por la venko de la sama ideo, ke ili egale ĝojas pri ĉiu sukceso, kaj edale malĝojas pri ĉiu malsukceso de tiu ĉi ideo, kaj ke ĉiuj artefarita apartigado portas malutilon al ideo egale amata de ĉiuj.

Trie — en la libro troviĝas kelkaj eraroj kaj malĝustaĵoj. Ili estus malpli multaj, se la stilo de la verko ne ŝajnus kvazaŭ ĝi estas verkita en rapideco. Mi montros tiujn, kiuj mi trovis. En la suba teksto, la unua cifero montras la numeron de la paĝo, kaj la dua — la numeron de la linio, de supre malsupren. La marko (Bulg) montras, ke la frazo estas farita sub la influo de la bulgara lingvo, aŭ ke ĝi estas laŭvorta traduko de tiu ĉi lingvo.

6.21. kiel ankaŭ 12.9. anstataŭ „doktoro“ devus esti „kuracisto“. Tio estas influo de la bulgara populara lingvo, en kiu „doktoro“ estas samsignifa kun „kuracisto“.

7.15. „La libro estas mia“ kaj 7.23. „Ĉu la libro estas via?“ ŝajnas esti laŭvorta traduko de la bulgara lingvo. Ĉu ne estus pli bone diri: la libro apartenas al mi?

7.25. kaj 26.7, 34 kaj 35. Ekzistas diferenco inter la formoj „kluba“ kaj „de

първата отъ които струва 18, а втората 7 лв.

Библията е настолна книга за изучване стила, за всички есперантисти, безъ разлика на убеждение по отношение на религията.

Остава ни още една много важна Заменхофова книга. Макарь че я разглеждаме въ този отдѣлъ, нейното мѣсто е, по право, въ отдѣла „Основни Съчинения“, защото тя не е преводна и защото действително спада къмъ основнитѣ съчинения на есперанто. Това е книгата.

11. *Originala Verkaro de D-ro L. L. Zamenhof*, форматъ 15 x 23 см., 604 страници, разкошно подвързана, цена около 350 лева.

Тази книга съдържа всичко, което Заменхофъ е написалъ оригинално на Есперанто, т. е. всичко, което не е преводно. Състои се отъ следнитѣ отдѣли: *предговори, конгресни речи, трактати, статии, писма, стихотворения*. Въ тази книга е включена известна частъ отъ основнитѣ съчинения, за което говорихме въ миналия брой. Тя е едновременно и *единъ езиковъ учебникъ* и *единъ учебникъ по историята и теорията на медунаро-*

дня езикъ есперанто. Необходима е за ония, които искатъ да се подготвятъ за изпититѣ за „*Karableco*“ и „*Supera Karableco*“ споредъ правилницитѣ на Изпитния Отдѣлъ при Българския Есперантски Институтъ.

Изброенитѣ въ тази статия съчинения на Заменхофъ обхващатъ общо 2527 страници и струватъ около 900 лева. Това не е нѣщо незначително, но пѣкъ и не е нѣщо непостижимо. Идеалтѣ на всѣкой есперантистъ трѣбва да бжде да си образува една библиотека, която постепенно да попълни съ съчиненията на Заменхофъ. Колкото и да е богата една есперантска библиотека, тя ще бжде праздна, щомъ въ нея липсватъ Зафенхофовитѣ съчинения. Колкото и много други книги да е прочелъ единъ есперантистъ, безъ съчиненията на Заменхофъ, езиктѣ му винаги ще бжде несъвършенъ и ще куца.

Последниятъ въпросъ е, какъ могатъ да се доставятъ тия книги. Този въпросъ може да се смѣтне засега за задоволително разрешенъ, тѣй като новооснованото бюро „Спиктурн“ се е заело съ това доставяне.

B Mazurski

klubo“, „biblioteka“ kaj „de biblioteko“. „Biblioteka gazeto“ ne estas ĉiam samsignifa kun „gazeto de (la) biblioteko“.

8.17 kaj 18. „Mi legas longe“ kaj „mi legas mallonge“ astas neklaraj kaj nekompletaj.

8.28. Mi diktas kaj vi skribu; 9.8, mi demandas kaj vi traduku; 13.9, mi diktas kaj vi skribu — ŝajnas al mi iom nekutimaj kaj similaj al la respondaj bulgaraj formoj.

9.8. „Ĉu via laboro estas granda“, ĉu oni ne povus uzi anstataŭ „laboro“ alian vorton, uzi tute alian frazon por diri la samon aŭ eĉ eviti la tutan frazon.

10.4,5,12,14 — Al la demando „kiu vi estas?“ oni respondas ne per la nomo de la profesio, sed per la nomo de la persono mem. La demando pri la profesio povas esti „kio vi estas?“ aŭ iu alia.

12.3 kaj 4. La demandoj „ĉu vi estas sana“ kaj „ĉu via kamarado estas sana?“ estas tute logikaj. Sed la aŭtoro forgesis, ke en esperanto ekzistas speciala verbo, per kiu oni demandas pri la stato de la sano — la verbo *farti*. Kvankam en la lernolibro oni multe parolas pri la sano, la verbo *farti* ne troviĝas en ĝi. Ĉu la aŭtoro opinias, ke ĝi apartenas al la malofte uzataj vortoj, aŭ tio estas influo de la bulgara lingvo, en kiu ne ekzistas speciala verbo por „*farti*“?

12.19,20,21,23,29,30. La vortoj „homo“ kaj „homoj“ estas tute superflua — la frazoj estas klaraj sen ili. Tio estas influo de la bulgara vorto „души“.

13.2. La dua „ni“ estas superflua; oni povas diri: Ni legas kaj skribas.

13.7. Vidu 7.25.

13.29. Antaŭ la vorto „kajeroj“ devas esti „la“.

13.29. „internacia“ kun artikolo, ĉar oni lernas la lingvon internacian kaj ne *iun el la* lingvoj internaciaj.

14.9. kiel 8.28.

14.19. „la“ antaŭ „francaj“ estas superflua.

14.30. „al vi“ en la fino de la frazo estas nebezona.

14.32. Ĉu oni ne povas doni pli belan frazon anstataŭ: de kiu vi havas la leteron?

15.9. Ĉu ne estas preferinde diri: Ĉu viaj kluboj estas bonaj?

16.16. „Ankoraŭ“ devas troviĝi inter „mi“ kaj „ne“.

16.08. „Internacia“ kun artikolo. kiel 13.39.

16.24. same.

16.25. Kion signifas la frazo: „Ili bone faras?“ (bulg.).

16.30. La diferenco inter gazeto kaj ĵurnalo ŝajnas ne tute klara por la aŭtoro, ĉar li uzas jen „gazeto“, jen „ĵurnalo“ sen ia distingo.

16.39 kaj 40. „Ĉu vi estas sana? Kion vi faras? Kion faras viaj fratoj?“ kaj 16.44 „estu sana“. Ĉi tie oni povus almenaŭ unufoje uzi la verbon „*farti*“. Vidu ankaŭ 12.3. Anstataŭ „estu sana“ oni povus uzi la belan, pure esperantan esprimon „*fartu bone*“.

17.15. „Internacia“ kun artikolo.

17.19. „korespondado“ anstataŭ „korespondo“

18.8. Anstataŭ „al“ — „por“.

19.9. kaj 19.22. „vespere“ kaj „komence“ ne estas egalaj al „en la vespero“ kaj „en la komenco“ Vidu ankaŭ 7.25 kaj 34.

19.24. kiel 17.19.

19.26. kiel 17.15.

19.29. La frazo: „jam estas multaj esperantistoj en diversaj landoj, kaj ili lernigas la homojn“ ne estas klara por mi.

19.34. „fin-paroloj?“ (bulg.).

20.6. preferinde: kuŝas sur la tablo.

21.8. kaj 21.12. „kiom ni havas?“ — Ĉu la frazo estas senerara?

21.17. „dekunuan“ kun artikolo.

21.25. „legi“ devas stari antaŭ „ankoraŭ“.

21.25. „unu“ superflua. „El literatura grupo“ ne ŝajnas al mi perfekta.

22.4,5,6 ktp. Oni uzis la formojn „plej granda“, „pli granda“ kaj oni tuj transiras al „pli malgranda“ kaj „plej malgranda“. Kial oni ne sekvis la tute logikan disvolviĝon de la bona ekzemplo kaj ne instruis la formojn „malpli granda“ kaj „malplej granda?“ Tiurilate esperanto estas pli riĉa ol la lingvo bulgara, kaj oni ne devas uzi nur tiujn formojn, kiuj troviĝas en la bulgara lingvo.

23.5,6 kaj 14. anstataŭ „faris“ devus esti „kreis“.

23.17. „En la gimnaziaj jaroj lin tre interesis socialaj problemoj“ — Nur en la gimnaziaj?!...

24. Leciono 13. La prepozicio „je“ tute ne estas uzata tiel arbitre, kiel oni ĝin uzis ĉi tie. 24.10 oni diras respondi AL kaj ne respondi JE. 24.21 ne „interesiĝis je“, sed „interesiĝis pri“.

24.16. „paroli je la temo“. Ĉu oni ne povas uzi alian formon, iom pli simplan, ekzemple „paroli pri“.

24.24. „diverso“?!? (bulg).

25.14. „Ĉu vi havas varmegon?“ — ĉu tio estas la plej trafa demando pri la varmeco de la tago?

26 paĝo. La uzado da la artikolo kelkfoje ŝajnas tute stranga. Oni diras: „kiu veturos al bulgara esperanta kongreso?“ Kaj, dume, ekzistas nur unu, sekve difinita, bulgara esperanto-kongreso. Kaj por ĝi oni devas uzi la artikolon „la“, kiel ankaŭ por „La lingvo internacia“. Tiel, kiel la aŭtoro uzas la artikolon, ŝajnas ke ekzistas multaj bulgaraj esperanto-kongresoj kaj multaj internaciaj lingvoj.

La adjektivo „esperanta“ devenas de la verbo esperi, kaj ne de la nomo Esperanto, tial oni devas iafoje preferi „esperantista“ kaj „esperanto“ — anstataŭ „esperanta“.

26.17. „Mi pensas ke la kongreso estos plenega“ — de kio?

26.37. Sama eraro kiel sur paĝo 10.

27.3 kaj 8. Oni ne diras kongres-bileto, sed kongres-karto.

27.24. Kion signifas „instrua laboro?“

27.29. „Ĉion bonan“ — kial ne „fartu bone?“.

28.22. „je“ estas arbitre uzita; devus esti „por“. La fundamenta regulo: „kiam la senco ne montras al ni kiun prepozicion uzi“ ne devas esti komprenata tiel: kiam iu esperantisto ne scias kiun prepozicion uzi, li povas uzi la prepozicion „je“. En tia okazo la esperantisto devas lerni.

28.23. „unu“ superflua.

30.3. „esperantistoj“ kun artikolo.

30.8 kaj 9. viroj — 1021 homoj.

virinoj — 81 homoj. Ĉi tie „homoj“ estas superflua (bulg). Krom tio, logike, virinoj ne estas „homoj“ sed „hominoj“.

30.32. preferinde estas „aboni gazeton“ ol „aboni al gazeto“.

31.1. „unu“ (bulg) superflua.

31.6. La du verboj „estas“ devus esti „estis“

31.20. „donis“ ne estas la ĝusta formo.

31.23. ne „sian“, sed „propran“.

31.33. „provinco“ kun artikolo, ĉar en en ĉiuj provincoj de la mondo.

32.13. vidu 7.25.

32.15. „kiam estos dudekjara jubileo de nia grupo“ — ĉu „estos“?

33.15. „proksima“ ne estas egala al „estonta“ kaj „venonta“.

33.25. „iam“ ne estas понѣкога, ĝi signifas нѣкога — en malproksima tempo. Ĉi tie devus stari „iafoje“ aŭ „iufoje“.

33.31. Anstataŭ „al“ devus esti „por“.

33.38. Ĉu anstataŭ „meti“ ne estas pli

Наскоро

ново поправено разширено юбилейно издание отъ Д-ръ Хитровъ

ПЪЛЕНЪ УЧЕБНИКЪ ПО ЕСПЕРАНТО

за курсове и самообучение съ граматика, упражнения, разговорникъ, христоматия, енциклопедия, 2 еспер.-бълг. и бълг.-еспер. речника съ адресникъ на българските есперантисти за предплатилитъ съ помѣстване адреса Ви 20 лева (после надъ 35 лева).

МІА АМІКО есперантска читанка съ енциклопедна частъ и адресникъ за предплатили съ помѣстване адреса Ви 18 лева, после 25 лева. Учебникъ **АРО**, международна стенографска система, изучаема 5 часа безъ надебеляване — готова 10 лева.

Сумитъ въ гербови или пощенски марки изпратете веднага до: **Ст. М. Хитровъ**, Велико Търново, или до: „**Спиктурн**“, международен институтъ, 50. ул. Алабинъ — София. Пощенска чекова смѣтка № 3616.

bone diri „publikigi“, aŭ „presigi?“

34.3. „kiom multe da?“ Ĉu tiu ĉi „multe“ estas necesa?

34.8. „sendi“ estas sufiĉa ankaŭ sen „al“.

34.10. „post ioma tempo ni starigos ĉiaman korespondon“. Ne „ioma“, sed „mallonga“, „kelka“. Ne „ĉiama“ (eterna), sed „konstanta“. Ne „korespondo“, sed „korespondado“.

35.10. Jen uzo de „je“, kie oni ne povas facile kompreni, kion oni volas diri, dum multaj aliaj prepozicioj estas uzeblaj.

35.28. „skribaĵo“ ĉi tie staras por надписъ (surskribo) kaj en 36.33 „skribaĵo“ signifas „leterojn“, „skribitajn paperojn“. Esperanto ne povas esti tiel arbitre elasta.

35.33 komenĉiĝas — devus esti „komenĉiĝis, ĉar tiel ĝi harmonius kun la supraj kaj malsupraj liniol.

35.13. ne „legiono“, sed „legio“.

36. kaj 8. „Praha“ — kaj sur paĝo 35 staras „Prago“. Kiu estas la ĝusta formo?

36.13. „ni vidis“ devus stari en la komenco de la frazo.

36.17. Oni ne devas intence kripligi la lingvon por illustri regulon. Anstataŭ „aĵoj“ — pli bona „objektoj“.

36.33 „Multo, multo alia“?!? (bulg).

37.6. Oni diras Parizo, Londono, Prago, kial ankaŭ ne Sofio, anstataŭ Sofia.

38.1. Ne „informaĵo“ sed „informo“.

38.31. „Propagandlibrojn“ povus esti egale bone „propagandajn librojn“.

38.40. „propagandaĵoj?“ — propagandilo, propagando.

38.34. Mi forte dubas, ĉu „havante tiujn eldonaĵojn, vi scios ĉiujn faktojn pri la internacia lingvo“. Per tiaj falsaj rekomendoj oni erarigas la komencantojn.

39.7,10 kaj 11. „Veturi“ ne estas samsignifa kun „Vojaĝi“.

39.9. paroladis, 10. paroladis, 16. montradis. Oni denove intence kripligis la lingvon por „ilustri regulon“. En ĉiuj tiuj formoj „ad“ estas superflua. En la lasta — ĝi estas ankaŭ nelogika.

40.24. „Eklaboris je la unua fojo“. Ĉu oni ne povas diri simple: komencis labori?

40.26. „montrados“ — „ad“ nebezonnata. Kaj ne „montri“, sed „prezenti“.

41.25. „Partoprenontoj ĉe la kursoj estas plejparte junuloj“ — denove artifike farita frazo por „ilustru regulon“.

42.2. „estas metota“ ne estas egala al „estos metita“.

42.22. ne „ricevitaj jam leteroj“, sed „jam ricevitaj leteroj“.

44. Leciono 22. La plej malfeliĉa leciono el la tuta libro. Ĝi svarmas de eraroj, faritaj ĉefe sub la influo de la bulgara lingvo. Mi montros la pli gravajn: estinta kunsido (lasta kunsido), rimarki (rimarkigi), unu gravan aferon (sen „unu“), ekvolis havi radio aparaton (bulg), unu sofia agentejo (sen „unu“), laboras (funkcias), necesas doni eblecon legi por 20 personoj, (?) forestas libera ĉambro, (mankas), venis jena penso (ideo), tradukaĵon (tradukon) 45.39. tre danke ma al vi (danka, dankas), kaplaborema samideano ekdeziros. (?)

47.27. „ĉe“ devas esti „en“.

47.31. aperis — aperas.

47.5. „En la raporto de unu lando al la Ligo de Nacioj oni diras jenon“ — la frazo tute ne ŝajnas bona al mi.

47.14. „moralan leviĝon“ (!!?)

48.17. ne „intereso al“, sed „intereso por“.

48.29 kaj 32. Kriplaj, artefaritaj frazoj por „ilustri regulon“: „esperanto estas disvastiginda inter la homoj“, kaj „esperanto estas lerninda de ĉiu pacema homo“, Krom tio, ne ĉiu „pacema“ homo estas adepto de la porpaca movado. „Pacema“ estas nur kvalito de la karaktero, ne de la konvinkoj kaj konceptoj.

49.9. „estus“ kaj „montrus“. La senco estas klara ankaŭ kun „estas“ kaj „montras“. Nebezonnata malsimpligo.

49.22. „Dume ĉion bonan. Ĝis la sekvonta letero“?!? Ĉu ne ekzistas pli klaraj kaj pli internacaj formoj? Kaj diferenco inter „sekvonta“ kaj „sekvanta?“

49.27. „la faktoj estas pripensindaj“. Ni ne devas peni esprimi ĉiujn ideojn per la formulo „A estas B“, ĉar tiam esperanto ne plu estos kultur-lingvo. Ĉu anstataŭ „estas pripensindaj“ oni ne povus diri „meritas atenton“ aŭ ion alian?

50.2. antaŭante — superante.

50.13. ricevitaj de mi — devus esti: kiujn mi ricevis.

50.13. ne „meti“ sed „publikigi“.

NIA POŝTO

— K. A., DUPNICA. Via provo traduki el bulgara lingvo en esperanton, kiel ĉiu unua provo, ne estas sukcesa. Precipe vi eraras ĉe la uzo de la akuzativo („pasas la revojn“, anst. la *revoj*, „tion estas nedaŭra“, anst. *tio* ktp.). Krom tio, vi apostrofas la adjektivojn („forpasos la hel' jarojn“ anst. *helaj jaroj*). Sed via ideo eklabori serioze en tiu ĉi direkto estas laŭdinda. Post multa ekzercado vi certe havos bonaj rezultojn.

— AL. D., KLEMENTINOVO, PLOVD. Vi estas mirinda modelo de bulgara kamparano, kiu, tute sola en la surda vilaĝeto, per obstina, konstanta kaj sistema laboro *jam troviĝas ĉe la sojlo de la perfekteco!* Vi jam povas libere okupiĝi pri literaturaj laboroj kiel *esp. tradukisto*. Estus tre edife kaj instrue, se vi en mallonga artikoleto sciigus al la bulgaraj samideanoj kiamaniere kaj per kiuj rimedoj vi atingis la perfektan lingvokanon. Volonte ni publikigos ĝin!

— GR. Ĵ., SOFIO. Al vi ne mankas talento. Ni konsilas al vi tamen verki prefere originalan *esp. prozon*, ne versojn. Ja via versaĵo laŭ enhavo kaj laŭ plenumo pli prezentas versoforman pro-

zon, ol poemon. Kaj vi devas akordi la *formon* kun la *enhavo*.

— M. TIH., TIRNOVO. „Senĝoja vivo“ estas bona, sed la tro malgranda amplekso de „*B. E.*“ ne permesas ke ni publikigu ĝin. Permesuĝal ni ke ni transsendu ĝin al alia *esp. gazeto*, kiu espereble donos al ĝi lokon.

— ZEFIRO, VARNA. Kial vi tradukas el franca lingvo? Vi povus ja traduki el la bulgara!

— I. SAM., BATAK. Kaj vi tradukas el rusa lingvo. Kvankam la elektita aŭtoro — Zoŝĉenko — estas tradukinda, tamen principo estas, ke el nacia lingvo traduku nur homoj, kiuj bone konas ĝin — do anoj de la respektiva nacio, kaj ne alinacianoj. Alia principo estas, ne oni traduku el la originalo mem. Vi tamen tradukis el la bulgara *traduko*. Per tiu re — kaj retradukado la freŝeco kaj la fideleco al la originalo grandprocente perdiĝas.

Traduku bulgarajn humoristojn: Aleko Konstantinov, Elin Pelin, Smirnenski, Ĉudomir k. a.

O. Virto

50.29. Same.

50.21. „nun ni ekhavis“ — „nun ni havas“.

50.22. por kio do tiu ĉi „mem“?

50.28. ne „neniuj“, sed „neniaj“.

50.29. „ĝi estas gojinda fakto kaj ni ĝoju pro tio“ (?!) „Ĝojinda fakto“ sed ridinda frazo. Tio estas unu el la plej malbonaj frazoj en la tuta verko. „Ĝojinda fakto“ estas laŭvorte traduko de la malbela bulgara esprimo „отраденъ фактъ“.

Ankaŭ en la dua parto — Legolibreto — troviĝas eraroj, ekzemple en la versaĵo „Milito“. La versaĵo „Mia preĝo“ ne devus stari tie, ĉar ĝi ne estas bone tradukita, kaj oni ricevas falsan impreson pri la talento de la verkisto, pri la maniero, en kiu oni devas traduki, kiel ankaŭ pri la spirito de la lingvo internacia.

La plimulto de la eraroj, kiujn oni trovas en la lernolibro de s-no Grigorov,

venas de tio, ke *lia verko havas la ĝeneralan difekton, kiun kavas preskaŭ ĉiuj lernolibroj eldonitaj en Bulgarujo. kaj multaj lernolibroj, eldonitaj en aliaj landoj.* Tiu ĉi difekto konsistas en tio, ke la aŭtoro de la lernolibro instruas al la lernantoj ne la oficialan *Zamenhofan stilon, sed li instruas sian propran stilon.* Ekzemple, en la lernolibro de A. Grigorov ĉiuj frazoj kaj ekzemploj, senescepte, estas verkitaĵoj de li mem. Li nenion prenis de la fundamentaj verkoj de la internacia lingvo. Tial la eraroj en lia verko estas tiel multaj. Kaj per simila instru-metodo oni rompas tion, kion ni pleje bezonas — la lingvan unuecon.

En la fino mi devas laŭdi la aŭtoron, ke li per sia lernolibro celas ne nur instrui la lingvon, sed ankaŭ fari el la lernantoj aktivajn esperantistojn, kiuj povas labori por la movado kaj subteni ĝin.

Borislao Mazurski

TEATRAĴOJ

La esperanto-klubo devas doni instruon kaj amuzon al la membroj. La plej agraba maniero kombini tiujn du dezirojn estas ludi teatraĵojn. Por helpi la klubojn, IEL kolektis el diversaj landoj iom da materialo. Kaj jam ĝi povas liveri la subajn teatraĵojn. Jen la listo:

- N-ro 1 (el Belgujo): „*La kolbasoj*“ de Jeanne van der Veken-van Boc- kel. (Ludebla en 15 minutoj: 1 sinjoro, 3 sinjorinoj).
- N-ro 2 (el Hungarujo): „*La paĝino de l' reĝino*“ de E. Heltai — E. Makai. (Ludebla en proks. 1 horo: 3 s-roj, 2 s-inoj).
- N-ro 3 (el Norvegujo): „*La skandalo*“ de Carl Haave. (Ludebla en 2 minutoj, 2 s-roj).
„*La hispana etiketo*“ de Carl Haave. (Ludebla en 4 minutoj, 2 s-roj, 1 s-ino).
„*Ĝarlatanaĵo*“. (Ludebla en 4 minutoj, 3 s-roj, 1 s-ino).
„*La diktafono*“. (Ludebla en 15 minutoj, 2 s-roj, 2 s-inoj).
- N-ro 4 (el Svedujo): „*Streko en la kalkulado*“ de E. Julin laŭ franca ideo, (Ludebla en 20 minutoj, 6 s-roj, 2 s-inoj).
- N-ro 5 (el Svedujo): „*Profesoro Forge- sulo*“ de E. Julin. (Ludebla en 4 minutoj, 3 s-roj, 1 s-ino).

„*Ĝe la dentisto*“ de E. Julin. (Ludebla en 10 min. 3 s-roj, 2 s-inoj).
„*En la vagonaro*“ de E. Julin. (Ludebla en 5 minutoj, 4 s-roj, 1 s-ino).

N-ro 6 (el Ĉeĥoslovakujo): „*La senvola svatanto*“ de Krysta Ludw. (Ludebla en duonhoro, 2 s-roj, 2 s-ino).

N-ro 7 (el Ĉeĥoslovakujo): Marionetaj ludoj, ilia prezentado, kaj „*Ter- poma tragedio*“ de Krysta Ludw. (Ludebla en duonhoro, 3 s-roj, 1 s-ino).

N-ro 8 (el Norvegujo): „*La provo*“. (Ludebla en 4 minutoj, 2 s-roj, 1 s-ino).

„*Virina artifiko*“. (Ludebla en 7 minutoj, 1 s-ro, 2 s-inoj).

„*La monprunto*“. (Ludebla en 10 minutoj, 4 s-roj, 1 s-ino).

„*La festanonco*“. (Ludebla en 3 minutoj, 1 s-ro, 1 s-ino).

SENPAGE

dum 4 monatoj ni liveros al ĉiu nova abonanto la plej interesan, amuzan kaj instruan gazeton en tutmondo

„VERDA REVUO“

se li pagos tutjaran abonprezon. Do, li pagos dekdu numerojn kaj ricevos

16 numerojn

La gazeto estas riĉe ilustrita, simple skribita kaj aperas regule ĉiumonate.

Abono 120 leva

Abonejo: „SPIKTURN“ internacia insti- tuto, 50. str. Alabin — Sofia.



Единственъ най-пълнъ и богатъ въ съставнитъ и технически думи съ илюстрации. Джобенъ форматъ, съдържа 130 страници.

Цената е народна за платилитъ до 1 януарий 1938 год. — само 10 лв. Следъ тая дата цената ще бжде повишена.

Поръчки при Дим. Ивановъ, Русе, „Неофитъ Рилски“ 60.

Vermlando

Eldonis: Esperanta Turista Komisiono, Tegelbacken, Stockholm. 1937. Formato 20 x 14 cm., 32 paĝoj.

Prezo: 1 respondkupono.

ESPERANTA TURISTA KOMISIONO eldonis turistbroŝuron pri la sveda provinco Vermland. La broŝuro samtempe estas jarlibro de E. T. K. La enhavo donas resumon pri la plej interesaj lokoj de tiu ĉarma provinco, kiu tiel famiĝis, ĉar la sveda verkistino Selma Lagerlöf al tiuj regionoj lokigis la aventurojn, kiuj troviĝas en ŝia libro „La fabelo pri Gösta Berling“.

ILUSTRITAN FALDPROSPEKTON pri Ĉeĥoslovakio senpage sendas al niaj legantoj: Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo, Praha XIX, Uralské 9.

X-a SOKOL - OLIMPIADO PRAHA 1938, ilustrita faldprospekto pri la festoj de la Ĉeĥoslovaka Gimnasta Asocio SOKOL, okazontaj en julio 1938. 8 pĝ. 15 x 10 cm. Senpage ricevebla ĉe: Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo, Praha XIX, Uralské 9.

GAZETO „FRATECO“ estas la malplej multekosta gazeto. Ĝi estas fonturo de la paco, de la vera scio kaj la racia vivo.

Abonu ĝin, sendante 10 levojn al ĝia redakcio: Frateco, Car Osvoboditel, — Sevlievo.

Deziras koresp. kun alilandanoj pri ĉ. temoj Dimitr Stavrev,
ul. Kresna 4, Plovdiv, bulg.

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO

Ĝuste solvis la krucvortenigmon, publikigitan en la pasinta numero de nia gazeto, la sekvantaj samideanoj: Inĝ. Iv. Nikolov, fervoj-laborejo, Drjanovo; D-ro Georgi P. Ivanov, Krušovica, Orjahovsko; Stilian Karamanĉev, la mitropolitejo, Nevrokop; Kunĉo Valev, gimnaziano, Sevlievo; Violin Oljanov, Varna; D. Sasonov, Asenovgrad kaj D. Andreev, Asenovgrad.

La premioj estas distribuitaj, per lotado, al jenaj samideanoj: ekzemleron de „Hamleto“ (traduko de Zamenhof) ricevas Violin Oljanov, Varna kaj po unu ekzemplero de „Fundamento de esperanto“ ricevas: Inĝ. Ivan Nikolov, Drjanovo kaj D-ro Georgi P. Ivanov — Krušovica.

Jen estas la solvo mem:

Horizontale. 1. veko, 6. Tas, 7. Bari, 10. embarasos, 13. Nu, 15. Bukanta, 16. ok, 17. ankros, 19. ofteco, 21. iro, 22. il, 24. Oke, 25. afiŝo, 27. Anoda, 29. ros', 30. lupol', 31. dan', 32. Arto, 34. mono, 36. mal, 37. pri, 39. art', 40. kolika, 42. devios, 45. en, 46. mistika, 48. ja, 49. spekulado, 51. obeo, 52. oni, 53. ilia.

Vertikale. 1. Vana, 2. ke, 3. ombros, 4. taksi, 5. Ara, 6. Sano, 7. Boaton, 8. As, 9. inko, 11. Buo, 12. STF, 14. uniformon, 16. ocedantoj, 18. kristal', 20. ekodori, 23. lepor, 25. Ara, 26. ol, 27. alk'; 28. ano, 33. Olimpo, 35. ravadi, 37. Pasko, 38. idili', 40. Kelo, 41. kie, 43. eka, 4. Sata, 44. Tun', 49. se, 50. ol.

Набавете си веднага помагалата отъ **Асень Григоровъ**,
редакторъ на сп. „Булгара Есперантисто“:

Учебникъ и читанка за начинающи ц. 18 лв.

Пъленъ есп.-бълг. речникъ ц. 15 лв.

Какъ да преподаваме есперанто

ръководство за лектори, ц. 10 лв.

Приематъ се чисти пощенски или гербови марки. Съ наложенъ платежъ не се праща. При обща поржчка надъ 100 лева — 25% отстъпъ. Доставятъ се само отъ автора:
Асень Григоровъ, ул. Охридъ 80, София II, пощ. чек. с-ка № 3621.